

La graco-plena pordo sin

FIT PORTA CHRISTI PERVIA



1. La gra - co - ple - na por - do sin
latine: Fit por - ta Chris - ti per - vi - a



mal - fer - mis nur por Krist', la Reĝ'.
om - ni re - fer - ta gra - ti - a,



Tra - pa - ŝis Li, nun res - tos ĝi
trans - it - que rex, et per - ma - net



de - no - ve fer - ma en e - tern'.
claus(a), ut fu - it, per sæ - cu - la.

La ripetado estas libervola.

2. Aperis Krist', la Dia Fil',
el ora hal' de l' Virgulin',
Fianĉ', Savant' kaj Mond-aŭtor',
hero' de Sia eklezi'.

*Summi Parentis Filius
processit aula Virginis,
sponsus, redemptor, conditor,
sucæ gigas Ecclesiæ:*

3. Li de l' patrin' honor' kaj ĝoj',
de l' kristanar' esper' sen lim',
sekvanta roko en dezert',
abunda grac' de l' tuta ter'.

*Honor matris et gaudium,
immensa spes credentium,
lapis de monte veniens
mundumque replens gratia.*

4. Jubilas kies ajn anim',
 ĉar kiel sav' de ĉiu gent'
 aperis la Regant' de l' mond',
 redempti, kiujn kreis Li.

*Exsultet omnis anima,
 quod nunc salvator gentium
 advenit mundi Dominus
 redimere quos condidit.*

5. Al Kristo estu ĉiu glor',
 la Patro Lin generis Di',
 patrino virga naskis Lin,
 fekundigita de l' Spirit'.

*Christo sit omnis gloria,
 quem Pater Deum genuit,
 quem Virgo mater edidit
 fecunda Sancto Spiritu.*

FIT PORTA CHRISTI PER VIA • Brevierhimno por la 1a de januaro, Matena
 Laŭdo • M: Albrecht Kronenberger 2022-09-07 • latina T: anonima • E: Al-
 brecht Kronenberger 2008